

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ

Accademia
Internazionale
delle Scienze



Internationale
Akademie der
Wissenschaften

International
Academy
of Sciences

Académie
Internationale
des Sciences

San-Marino

Международна Академия на Науките Сан Марино

28-a SANMARINECA UNIVERSITATA STUDADSESIO

SUS 28

Карлово / Karlovo (BG)

2005-08-20 / 28

(1704 pFR)

Achtundzwanzigste Sanmarinesische Universitäre Studentagung

Ventottesima Sessione Universitaria Sammarinese

Twenty-eighth Sanmarinian University Session

Vingt-huitième Séance Universitaire Sanmarinienne

Двадесет и осма Университетска учебна Сесия
на МАН Сан Марино

Programo de SUS 28

La studadsesio SUS 28 de AIS okazos en la urbo Карлово / Karlovo (BG), en Internacia Universitato Karlovo, strato „Otets Pajsiĵ“ (Отец Пайсий) 1.

La tempoj indikitaj en tiu ĉi eldono estas ankoraŭ provizoraj kaj povas ŝanĝiĝi.

1 Oficialaĵoj

dato	horo	evento	salono
08-21 di	10:00–11:00	senatkunsido (nepublika)	Peano
	11:00–12:00	ekzamenofico (nepublika)	Peano
	12:00–13:00	ekzamenofico (konsult-horo)	Peano
	16:00–17:00	assembleo de la Subtena Sektoro	Peano
	17:00–20:00	inaŭguro de SUS 28, kun prelego de AProf. R. Corsetti	Boulangier
08-23 ma	20:00–20:30	sekcikunsidoj 1–6	sekcisalonoj
08-24 me	20:00–21:30	forumo pri akad. rekomendoj	Boulangier
08-27 sa	16:00–17:00	ĝenerala assembleo de SciS	Komenský
	17:00–18:00	fermo de SUS 28	Komenský

2 Protektanto kaj Honora Komitato

Honora protektanto de SUS 28 estas d-ro Emil Kabaivanov, urbestro de Karlovo. La Honora Komitato konsistas el:

- AProf. Renato Corsetti dr., prezidanto de UEA
- OProf. Dr. habil. Helmar FRANK
- Helena Miszak, EU-respondeculo pri la slavaj landoj
- OProf. Rüdiger SACHS dr.
- AProf. Walter ZELAZNY dr. hab.



d-ro Emil
Kabaivanov

3 Organiza Komitato

- EProf. B. LEONOV, prezidanto
- EProf. A. LEWANDERSKA-QUEDNAU, vicprezidanto
- EProf. N. RALEV, vicprezidanto
- OProf. Dr. G. LOBIN
- OProf. Dr. H. QUEDNAU
- Inĝ. P. TODOROV, prezidanto de BEA

4 Kursoj kaj prelegoj

4.1 Sciencaj kursoj

La sekvaj kursoj – validaj po unu stud-unuon (stu) – okazos ekde lundo ĝis ĵaŭdo (08-22/08-25), ĉiutage je la sama tempo, en blokoj nomataj A/B/C/D¹. La du-horaj blokoj inkluzivas paŭzo(j)n de 30 minutoj, pri kiuj individue decidas la kursestroj. La longaj paŭzoj tagmeza kaj vesperaj nomiĝas M kaj V:

	A	B	M	C	D	V
kurso	8:30–10:30	10:30–12:30	12:30–14:00	14:00–16:00	16:00–18:00	18:00–19:30

¹Por eviti miskomprenojn ni ne uzas la literon Ĉ por marki blokon.

Sekcio 1: Kibernetiko

K1 OProf. Dr. habil. Eva Poláková (Komárno, SK)

Amaskomunikiloj en multkultura socio (bloko B)

Sekcio 2: Humanistiko

H1 AProf. Ana Vrajitoru dr. conf. (Iași, RO), OProf. Dr. habil. Helmar Frank (Paderborn, DE), Mag. Cristina Tanc (RO)

La Sibiua programo de eŭrolingvistiko (bloko D)

La kurso okazas kunlabore kun sekcio 1.

Komence de SUS 28 estos decidite, ĉu kaj kiam povos okazi kurso pri **Hispanaj lingvo kaj kulturo** de AProf. Vrajitoru kaj ASci. Casquero. Eble tiu kurso okazos ekster la regula tempo-skemo. Detaloj estos afiŝitaj.

Sekcio 5: Natursciencoj

N1 AProf. Dr. habil. Jerzy Lechowski, Varsovio (PL)

Apliko de teorio de inform-emocia kampo en asekuo en turismiko (bloko A)

N3 OProf. Quednau dr. (Haag/Amper, DE)

Flaŭro kaj faŭno en Eŭropio (bloko C)

N4 OProf. Kiril Popov (BG), AProf. Dr. habil. Kauffmann (DE), EProf. Mag. Lewanderska-Quednau dr. (Haag/Amper, DE)

Interdisciplina metodiko de nuligo de kronika sento de doloro (bloko D)

Sekcio 6: Morfosciencoj

M1 OProf. Dr. Lobin (Paderborn, DE), EProf. Bojidar Leonov, Karlovo (BG), EProf. Mag. Lewanderska-Quednau dr. (Haag/Amper, DE)

Modernaj kaj tradiciaj metodoj de instruado (bloko A)

En la programtabelo la kurso estas nomata „M1 instruado“.

M2 OProf. Dr. Lobin (Paderborn, DE), EProf. Bojidar Leonov (Karlovo, BG)

Ekologio kaj turismo (bloko B)

En la programtabelo la kurso estas nomata „M2 ekologio“.

M3 OProf. Dr. Lobin (Paderborn, DE), ASci. Mag. Timermane (Riga, LV)

La situacio de la turismo en Latvio. La ĝisnuna kaj estonta evoluo (bloko C)

En la programtabelo la kurso estas nomata „M3 Latvio“.

4.2 Liberaj prelegoj (konferencprogramo de SUS 28)

Liberaj prelegoj kaj projekt-akceptigaj prelegoj okazas en la sekciaj salonoj, plejparte dum bloko D.

K-p1 ADoc. Dr. Ljubiša Preradović (Banja Luka, BA)

Informadiko en la turismo (lunde)

K-p2 EProf. ADoc. Mag. Sara Konnerth (Sibiu-Hermannstadt, RO)

Studado pere de AIS en la universitato de Sibiu (marde)

N-p1 OProf. Hans Dietrich Quednau (Haag/Amper, DE)

Verkado de retaj lernobjektoj kun apliko de internaciaj normoj (marde, en salono Schmidt)

M-p1 EProf. N. Ralev (BG)

(temo anoncota) (merkrede)

Dum la inaŭguro AProf. Renato Corsetti prelegos pri **Lingvo-akirado ĉe infanoj kaj junuloj en pluraj lingvomedioj.**

4.3 Teknika (Scienc-aplika) Sektoro

Te1 Prof^T. Gennadij Ŝilo (Moskvo, RU)

Juro de Eŭropa Unio – eventuala vojo al Tutmonda Juro (sabate la 20-an, dimanĉe la 21-an)

4.4 Lingvokursoj

Li1 Mag. Cristina Tanc (Sibiu, RO)

Ilo por komencantoj (sabate la 20-an, A–D)

Li2 ADoc. Eva Bojaĝieva (Plovdiv, BG)

Ilo por progresantoj (sabate/dimanĉe la 20/21-an, V–C)

Li3 EProf. Bojidar Leonov (Karlovo, BG), Mariana Evlogieva (BG)

Enkonduko al la Bulgara (sabate/dimanĉe la 20/21-an, D/A–C)

Komence de SUS 28 estos decidite, ĉu povos okazi enkonduka kurso pri la hispana lingvo, gvidata de ASci. Augusto Casquero.

5 Kandidataj finekzamenoj

La finekzamenoj por kandidatoj, kiuj celas originale aŭ per adapta adopto akiri ĉe AIS la agnoskon de akademia nivelo (bakalaŭreco, magistrecio, doktoreco aŭ habilit-doktoreco), okazas je vendredo (08-26) kaj eble sabato (08-27), laŭ surloke afiŝota horaro. La kandidatprelegoj estas publikaj, kaj ĉiuj SUS-anoj estas bonvenaj ĉeesti la prelegojn de la kandidatoj kaj la postajn diskutojn. Parolaj fakekzamenoj (nepublikaj) kaj skribaj ekzamenoj (se necesaj) okazos laŭ horaro afiŝota de la Ekzamenofico.

La ekzamen- kaj studregularoj de AIS ŝanĝiĝis je 2004-06-14, sed ĉiu, kiu studentiĝis antaŭ tiu dato, rajtas ene de la valideco de sia legitimilo diplomiĝi laŭ la malnovaj regularoj. Ĉiu kandidato antaŭ sia finekzameniĝo nepre devas esti enskribiĝinta al minimume du (2) [malnovaj regularoj: tri (3)] sciencaj SUS-kursoj (se li ne jam havas la bezonatajn kurs-atestojn). Inter la du [tri] kursoj minimume unu devas esti en la sekcio, en kiu okazas la kandidatiĝo, minimume unu devas esti el alia sekcio. Laŭ la malnovaj regularoj maksimume unu el tiuj kursoj povas esti lingvokurso. Entute estas bezonataj kvar (4) atestitaj kursaj studunuoj; nur por adapta adopto sufiĉas, laŭ la novaj regularoj, la du SUS-kursoj.

Laŭ la novaj regularoj necesas sukcesa ekzameno pri ĉiuj kursoj; laŭ la malnovaj, en almenaŭ unu kurso (kaj en almenaŭ du, se ĉiuj studunuoj bezonataj por la fina ekzameno estas akiritaj dum la SUS) la kandidato devas sukcesi en la kursfina ekzameneto per minimume la noto 6/10 (7/10 sen ĉeesto en kurso).

La Ekzamenofico atentigas kandidatojn, ke prezentiĝo al la fina ekzameno sen antaŭa regularkonforma kompletigo kaj disponigo de ĉiuj necesaj dokumentoj al la Ekzamenofico povas kaŭzi aŭ *malakcepton de la kandidatiĝo* aŭ *postulon de krompago superanta la normalan ekzamenkotizon* pro la kroma laboro. Finan konstaton pri la plenumiteco de ĉiuj kondiĉoj nuntempe necesaj por akiri la agnoskon de sciencista grado de AIS oni jam ne ricevos pli ol du jarojn post la fina ekzameno. *Eksvalidiĝos do titol-agnoskoj, se eventualaj skribe fiksitaj kompletig-postuloj ne estos plenumitaj* de la kandidato dum tiuj du jaroj.

**Por eviti tiajn problemojn bv. rekontroli,
ĉu ĉiuj viaj ekzamen-dokumentoj jam troviĝas ĉe la Ekzamenofico!**

La Ekzamenoficon por la jaroj 2004–2007 konsistigas

Direktoro:	OProf. Quednau
Vicdirektoro:	OProf. Polakova
sekcio 1 (kibernetiko):	OProf. Fössmeier
sekcio 2 (humanistiko):	OProf. Korĵenevskaĵa-Gouriou
sekcio 3 (struktursciencoj):	OProf. Minnaja
sekcio 4 (filozofio):	OProf. Angstl
sekcio 5 (natursciencoj):	OProf. Maitzen
sekcio 6 (morfosciencoj):	OProf. Lobin

6 Kadra Programo

Tradicie, AIS invitas ĉiujn SUS-anojn al la partopreno en la **Akademia Forumo** (2005-08-24) kun publika diskuto. La temo antaŭvideble estos „Terorismo el religia kaj filozofia vidpunktoj“.

Okazos kunsido de la **Subtena Sektoro** (2005-08-21) kaj **ĝenerala asembleo (ĜA) de la Scienca Sektoro** (2005-08-27). Tie voĉdoni rajtas la subtenaj membroj resp. la efektivaj membroj. En la ĜA krome ĉiuj adjunktoj havas la rajton ĉeesti; asociitaj docentoj (ADoc) havas krome la parolrajton.

Antaŭvideble okazos ekskurso al la urbeto *Sopot*, kiu situas iom okcidente de Karlovo, en la „valo de la rozoj“.

7 Organizaj detaloj

Ĉiu interesulo rajtas aliĝi al SUS. Ne necesas formalaj sciencaj kvalifikoj.

7.1 Kursoj kaj kursfinaj ekzamenetoj

Ĉiu SUS-ano rajtas senpage enskribiĝi kaj partopreni kursojn (tion inkluzivas la aliĝkotizo). Kontraŭ aparta kotizo (po 0,3 AKU por unu kurso) oni ricevas oficialan partopren-ateston, ĉeestinte minimume 3/4jn, kaj noton, se oni sukcesis en la kursfina ekzameneto. La ekzameno povas okazi en skriba formo, ekzemple per elekt-respondoj aŭ liberaj respondoj konsistantaj nur el nomoj, nombroj aŭ unuopaj vortoj, tiel ke sufiĉas kompreno de ILo kaj ne necesas propra esprim-kapablo. La ekzameneton oni rajtas partopreni sen ĉeesti la kurson dum la sama SUS, do iamaĵ kursanoj povas ripeti la ekzameneton.

Ankaŭ pri kursoj ofertataj en la *instruteko* (vidu ĉapitron 8) povas okazi ekzamenetoj por studentoj, kiuj aŭtodidakte preparis sin.

Se studanto ekzameniĝas sen 3/4-a partopreno en kurso, li devas sukcesi minimume per la noto 7/10 por ricevi ateston.

La kursfinaj ekzamenetoj de la sciencaj kursoj okazos ĵaŭde (08-25) vespere, se nenio alia estas anoncita dum la kursoj. La SUS-anoj, kiuj intencas akiri kurs-atestojn, enskribiĝu al la kursoj ĉe la SUS-oficejo dum la akcepto-/registriĝ-tagoj (08-20/21) aŭ anoncu sian intencon dum la unua leciono.

Bonvolu atenti, ke je 2004-06-14 ŝanĝiĝis la regularoj de AIS. Kiu studentiĝis post tiu dato, povas akiri studunuojn nur per kursfina ekzameneto; puraj partopren-atestoj ne plu validas.

7.2 Prelegoj

La preleg-kunsidojn gvidas la dekanoj aŭ vicdekanoj de la koncerna sekcio, aŭ taskitoj de ili. La partopreno en prelegoj (kontraŭe al partopreno en kunordigita preleg-serio) ne egalvaloras al kurspartopreno.

Debutprelegojn prezentas nove alvokitaj profesoroj, *docentiĝprelegojn* estontaj plenrajtaj docentoj de AIS. La prelegoj daŭras po 45–60 minutojn, inkluzive de diskuto kaj paŭzeto. La preleglingvo estas ILo.

La sama tempo estas je dispono por *invititaj prelegoj* (en iu ajn oficiala lingvo de AIS) kaj por *projekt-akceptigaj prelegoj* (en ILo) de kandidatoj, kiuj celas estontan originalan akiron (ne adopton) de grado de AIS.

Ankaŭ liberaj ISKanoj (t. e. ISKanoj, kiuj ankoraŭ ne kiel adjunktoj aŭ efektivaj membroj apartenas al AIS) rajtas prezenti t. n. *liberajn prelegojn*, pere de la dekanato de la koncerna sekcio. Ili rajtas okazi en iu ajn oficiala lingvo de AIS kaj daŭri po 25–40 minutojn.

Ankaŭ *konciz-prelegoj* (10–20 minutoj) povas okazi en ajna oficiala lingvo de AIS. Ili estas oferteblaj ankoraŭ post la starigo de la SUS-programo, tra la koncerna (vic)dekanato aŭ (vic)fakarestro. Temoj de konciz-prelegoj ne listigitaj en la programkajero estos afiŝataj dum SUS laŭ la informoj transdonitaj de la prelegontoj al la SUS-oficejo.

7.3 Aliĝo

Aliĝilojn bonvolu sendi al la senata sekretario (Dr. Reinhard Fössmeier, Rahel-Straus-Weg 19, DE-81673 München, Germanio; retpoŝto info(heliko)ais-sanmarino.org). Informoj pri SUS 28 troviĝas rete ĉe

www.ais-sanmarino.org/arangxoj/sus/sus28.

Bonvolu atenti, ke aliĝoj ne estas trakteblaj sen pago de la aliĝkotizo. La kotizo ne inkluzivas ekzamenkostojn, kurskotizojn (por ricevo de atesto), kostojn por loĝado kaj manĝado. Aliĝo ne estas transdonebla.

SUS ne asekuras siajn partoprenantojn kontraŭ malsano, akcidentoj aŭ io alia. Bonvolu atenti, ke multaj malsan-asekuroj ne asekuras malsanon en eksterlando. Konsilindas speciala asekuro por eksterlandaj vojaĝoj.

Pagi aliĝkotizon devas ankaŭ *kursgvidontoj* kaj *prelegontoj*. Kurs- kaj prelegproponoj kaj aliĝoj por ekzameno estas trakteblaj nur post alveno de la SUS-aliĝkotizo.

Ĝis unu monato antaŭ la komenco de la sesio (t. e. ĝis 2005-07-23) la aliĝkotizo estas nur 0,3 AKU, poste 0,5 AKU. Kotizo por unutaga partopreno en SUS estas po 0,2 AKU. Partoprenantoj el reform-eŭropaj landoj rajtas je rabato de 80 %. La kotizo estas pagebla laŭ jenaj vojoj (ĉiam kun indiko de la pagocelo kaj de la nomo de la aliĝanto):

- al la Germana konto 2051-305 de AIS ĉe Postbank Hannover, banko-kodo 25010030, Swift-kodo PBNKDEFF250; IBAN DE19 2501 0030 0002 0513 05, BIC: PBNKDEFF.
- al la UEA-konto de AIS: aisc-j.
- Pro la altaj bankokostoj ni petas ne sendi ĉekojn.

ISKanoj, kies servobonhavo havas pluson de almenaŭ 0,5 AKU, povas simple deprenigi la kotizon de ĝi. Dumvivaj subtenaj membroj kaj studentoj kun valida legitimilo ne pagas SUS-kotizon, se ili aliĝas minimume kvar semajnojn antaŭ la sesio; poste ili pagas 0,2 AKU.

7.4 Mono

Kadre de AIS kostoj kaj prezoj estas indikataj en „Akademiaj Kotiz-Unuoj“ (AKU). 1 AKU nun valoras € 65,00. Dum SUS 28 AIS akceptas pagojn en eŭroj aŭ en la loka valuto, la (nova) Bulgara levo (BGN, Лев).

Informo sen garantio: De 1999 la levo sekvas la eŭron laŭ la kurzo de la iama germana marko (1 EUR = 1,95583 BGN, do proksimume 1 BGN = 0,51 EUR). Ĝi dividiĝas en 100 *stotinki* (стотинки = centimoj). Malnovaj levoj (kiuj valoris nur milonon de la novaj) ne plu



Bildo 1: Bulgaraj moneroj

validas. Biletoj de 1.000 aŭ 10.000 levoj estas malnovaj; cirkulas aŭtentikaj biletoj de 1, 2, 5, 10, 20, 50 kaj 100 levoj kaj moneroj de 5, 10, 20 kaj 50 *stotinki* kaj de 1 levo.

7.5 Salonoj

La salonoj estas nomitaj honore al jenaj eminentuloj:

ARISTOTELO de Stagira, Helene *Αριστοτέλης* (384–322 a. K.)

Helena filozofo, fondinto de la empiria naturscienco en la kadro de ampleksa empiria sistemo kondukanta de la logiko ĝis la ŝtatteorio. Liaj instruoj ĝis la fino de la mezepoko restis la fundamento de sciencaj instruado kaj esplorado. Li estis disĉiplo de Platono kaj instruisto de Aleksandro la Granda.

George BOULANGER (1909–1982)

Fondinto (en 1957) de *Association Internationale de Cybernétique* (Namur, BE) kaj ties prezidanto ĝis sia morto; en 1980 enkondukis en tiun asocion ILOn kiel trian laborlingvon, eklerninte ĝin kiel 70-jarulo. Vicprezidanto de Eŭropa Klubo kaj membro de ties iniciat-grupo AIS.

René DESCARTES, Latine: Renatus Cartesius, ILe: Kartezio (1596–1650)

„La patro de la moderna filozofio“, kiel oni ofte nomas lin, provis ligi filozofion al la natursciencoj aplikante al ambaŭ racian metodon. Sian mekanikan mondkoncepton li aplikis eĉ en psikologio. Li skizis ankaŭ principojn de planlingvo en sia letero de la 20-a de novembro 1629 al la benediktana scienculo *Mersenne*.

EŬKLIDO de Aleksandrio (*Ευκλείδης*) (ĉ. 365–ĉ. 300 a. K.)

Helena matematikisto kaj naturesploristo, kiu laboris sub Ptolemeo (Ptolemaios) la 1-a ĉe la „Museion“ en Aleksandrio. Lia plej fama verko estas la libro „Elementoj“, aksioma prezento de la tutaj tiamaj geometrio kaj aritmetiko. Krome li verkis manlibron „Geometria optiko“ kaj aliajn traktaĵojn pri planimetrio, sfero kaj matematika muzikteorio.

Galileo GALILEI (1564–1642)

Kvankam liaj ideoj troviĝas kadre de la kristana mondkoncepto, la Itallingva natursciencisto konfliktis kun la katolika eklezio pro sia verko pri la galaksi-modeloj, en kiu li argumentas por nova, kies centro estas la suno. Kiel unu el la unuaj sciencistoj li verkis ne plu en la Latina lingvo, nekomprenata de vasta publiko.

Mohandas Karamchand GANDHI / *मोहनदास करमचन्द गांधी* (1869–1948)

Hinda politikisto, kiu proklamis senbatalilan ribelon kontraŭ la okupadaj trupoj, per manŝpinado kontraŭ la teksaj fabrikoj de Britio, per „salmarŝo“ kontraŭ la brita salmonopolo, per reiro al simpla natura vivoformo, por formi sendependan komunan ŝtaton de hinduoj kaj islamanoj. Li subtenis la ideon de la Internacia Lingvo, kunlaborante kun la svisa sciencisto *Edmond Privat*.



Bildo 2: Gravaj vojoj al Karlovo

Jan Amos KOMENSKÝ, Latine: Johannes Amos Comenius. ILe: Komenio (1592–1670)
La fondinto de la moderna pedagogio ne nur teorie, sen ankaŭ praktike kontribuis al sia fako, i.a. per facila lingvoinstrua legolibro. Li proponis la enkondukon de planlingvo kaj la starigon de internacia akademio de la sciencoj.

Giuseppe PEANO (1852–1932)

La Itala matematikisto interalie starigis sistemon por aksioma difino de la naturaj nombroj. En 1903 li prezentis planlingvan projekton de simpligita Latino, nomatan „*Latino sine flexione*“; en tiu lingvo li eldonis sian verkon *Formulario Mathematico*. Ek de 1909 li estis prezidanto de la planlingva akademio *Academia pro Interlingua*.

Hermann SCHMIDT (1894–1968)

Jam en la jaro 1941 la Germana fizikisto kaj regulad-teknikisto prezentis la bazajn principojn de kibernetiko. Ek de ĉ. 1962 li pli kaj pli influis la filozofion de klerig-kibernetiko kaj de aliaj antropokibernetikaj branĉoj.

8 Instruteko

Dum SUS 28 eblas akiri studunojn ankaŭ surbaze de memstara studado de kursoj el la instruteko de AIS, se la kandidato sukcesas en kursfina ekzameno per noto de minimume 7/10. La ekzameno povas okazi dum SUS 28, se la kandidato sciigas sian deziron kun indiko de la elektita(j) kurso(j) plej malfrue **ses semajnojn** antaŭ la malfermo de SUS 28 al la ekzamen- kaj klerigofico (OProf. H. D. Quednau, Forstwissenschaftliche Fakultät, Am Hochanger 13, DE-85354 Freising).

Superrigardo pri la Interretaj kursoj de AIS troviĝas ĉe www.ais-sanmarino.org/kursoj/. Sed ne ĉiuj tiuj kursoj estas disponeblaj por ekzameno dum SUS 28. Ĉe intereso bonvolu informiĝi ĉe la klerigofico.


9 Situo de Karlovo

Karlovo (Карлово) situas en Bulgario ĉ. 120 km oriente de la ĉefurbo Sofio (София) kaj havas ĉirkaŭ 28.000 loĝantojn. Ĝi apartenas province al Plovdiv, la dua plej granda urbo de Bulgario, kiu situas proksimume 50 km sude de Karlovo. La tempozone de Bulgario antaŭas la mezeŭropan tempon (somere kaj vintre) je unu horo.

Karlovo situas je 42, 65° de norda latitudo kaj 24, 80° de orienta longitudo, je la sama latitudo kiel Sofio, Dubrovnik, Romo, Perpignan, Santiago de Compostela, Sapor, Detroit kaj Boston kaj sur la sama longitudo kiel Helsinko, Vilno, Kisangani kaj Port Elizabeth. Ĝia meza alto super marnivelo estas ĉirkaŭ 380 metroj. Ĝi situas sude de la montaro Stara Planina kaj oriente de la montaro Sredna Gora, ĉe rivero Stara Reka. Tiuj nomoj signifas "Malnova Montaro", "Meza Monto" kaj "Malnova Rivero". "Stara Planina" estas la montaro nomata "Balkano" en multaj lingvoj.

La urbo informas pri si Interrete sub www.karlovo.bg en la lingvoj bulgara kaj angla. La poŝtkodo de Karlovo estas BG-4300.

La regiono de Karlovo estas fama pro siaj rozoj kaj la oleo produktata el iliaj petaloj. La urbo Karlovo estas fama pro sia filo *Vasil Levski*, naskita en 1837, kiu rezistis al la turkaj regantoj.



SUS-ejoj. La plejparto de la SUS-programo okazas en Internacia Universitato Karlovo (IUK), strato „Otets Paisij“ (Отец Паисий) 1. Por atingi ĝin de la stacidomo oni eniru straton Aleksandâr Stambolijski (dekstre antaŭ la stacidomo) kaj iru maldekstren je la kvina strato (sen pakaĵoj ĉ. kvin minutoj; komparu la skizon). La konstruaĵo estas blanka-blua kaj situas ĉe monumento de Vasil Levski.

Loĝado. Se vi ne volas mem zorgi pri loĝado, bonvolu turniĝi al EProf. Boĵidar Leonov, Car Asen 7, BG-4300 Karlovo.

Alvojaĝo. Trajne kaj aŭte Karlovo situas sur la vojo inter Sofio kaj Burgas. La fervoja kaj la aŭtobusa stacioj situas interproksime en la suda parto de Karlovo (komparu la mapo-skizon).

Ĉar Plovdiv, kiu situas en valo de rivero Marica, havas pli bonajn trafikajn konektojn ol Karlovo (aŭtovojo kaj fervojo inter Sofio kaj Turkio), povas esti interese iri tra Plovdiv (sude), eĉ venante de okcidento aŭ oriento. Krudan superrigardon donas mapeto (bildo 2).

La plej proksima linia flughaveno estas tiu de Sofio.

Telefonado. La internacia antaŭnumero de Bulgario estas **359**, la urba kodo de Karlovo 3359. Por konekto eksterlanden cifurumu **00**.

Publikaj (strataj) telefonoj en Bulgario estas mastrumataj de du kompanioj, Bulfon (oranĝkolora) kaj Mobika (blua). Por telefoni eksterlanden necesas telefonkartoj (ne-interkongruaj inter la du kompanioj). La tarifoj de la du kompanioj estas similaj. Ekzistas kartoj por diversaj nombroj da unuoj („impulsoj“); pli valoraj kartoj donas pli favoran prezon. Ofte la aparatoj de la du kompanioj staras proksime. Kelkaj aparatoj funkcias ankaŭ per kreditkartoj.



Lingvo. La oficiala lingvo en Bulgario estas la Bulgara, skribata per cirilaj literoj. En kelkaj rilatoj ĝi similas al la Rusa, en aliaj al la Slovaka aŭ aliaj slavaj lingvoj. Apartaĵo estas litero **ъ**, memstara vokalo malakra prononcata inter „e“ kaj „u“ (kiel „â“ en la Rumana).

Kelkaj Bulgaraj esprimoj (la sonon de ъ reprezentas â)		
Bulgare	(prononco)	traduko
да	da	jes
не	ne	ne
как сте?	ka <u>k</u> ste?	kiel vi fartas?
добре	do <u>b</u> re	bone
моля	mo <u>l</u> ja	mi petas
благодаря	bla <u>g</u> odarja	mi dankas
заповядайте	zapo <u>v</u> jadajte	ne dankinde (ordonu!)
добро утро	do <u>b</u> ro <u>u</u> tro	bonan matenon
добър ден	do <u>b</u> â <u>r</u> den	bonan tagon
добър вечер	do <u>b</u> â <u>r</u> ve <u>ç</u> er	bonan vesperon
тоалетна	toa <u>l</u> etna	necesejo
– Ж, жени	ĵe <u>n</u> i	– virinoj
– М, мъже	ma <u>ĵ</u> e	– viroj
наздраве	na <u>z</u> drave	je via sano
извинете	iz <u>v</u> inete	pardonu
къде е...	ka <u>ĉ</u> e e	kie estas...
университет	uni <u>v</u> ersitet	universitato
фонокарта	fo <u>n</u> okarta	telefonkarto(n)
менюта	me <u>n</u> ĵuta	la menukarto(n)
сметката	sm <u>e</u> tkata	la fakturo(n)
разбирате ли ...	ra <u>z</u> birate li	Ĉu vi komprenas...
– Есперанто?	es <u>per</u> anto?	– Esperanton?
– английски?	an <u>g</u> lijski?	– la anglan?
– френски?	fr <u>e</u> nski?	– la francan?
– немски?	ne <u>m</u> ski?	– la germanan?
– италиански?	ita <u>l</u> ianski?	– la italan?
– румънски?	ru <u>m</u> ânski?	– la rumanan?
– руски?	ru <u>s</u> ki?	– la rusan?

La urbonomo „Karlovo“ (Карлово) estas akcentata sur la unua silabo en la Bulgara.

Estas atentinde, ke kapjesado kaj kapneado en Bulgario (simile kiel en Grekio) funkcias malsame ol en aliaj Eŭropaj landoj. Tion lerni ne estas facile; estas konsilinde ĉiam aldoni la vorton „da“ (= jes) resp. „ne“ (= ne).

Enhavo

1	Oficialaĵoj	2
2	Protektanto kaj Honora Komitato	2
3	Organiza Komitato	2
4	Kursoj kaj prelegoj	2
4.1	Sciencaj kursoj	2
4.2	Liberaj prelegoj (konferencprogramo de SUS 28)	3
4.3	Teknika (Scienc-aplika) Sektoro	4
4.4	Lingvokursoj	4
5	Kandidataj finekzamenoj	4
6	Kadra Programo	5
7	Organizaj detaloj	5
7.1	Kursoj kaj kursfinaj ekzamenetoj	5
7.2	Prelegoj	5
7.3	Aliĝo	6
7.4	Mono	6
7.5	Salonoj	7
8	Instruteko	8
9	Situo de Karlovo	8
	Programtabelo	12

Kalendareto								
	lu	ma	me	ĵa	ve	sa	di	
	15	16	17	18	19	20	21	aŭg
aŭg	22	23	24	25	26	27	28	
	29	30	31	1	2	3	4	sep

Tabela programo

	sal.	A 8:30–10:30	B 10:30–12:30	C 14:00–16:00	D 16:00–18:00	V vespere
sab 08-20	Ko	ILO 1				ILO 2
	Ar				Bulgara	
	Dc	Ŝilo: EU-juro				
dim 08-21	Ko	ILO 2				
	Ar	Bulgara				
	Dc Gl		EU-juro ekzamenofico 11:00 nepublika 12:00 konsultado		SubS 17:00 inaŭguro (Boulangier)	
lun 08-22	Sm Ko Gl Ar	N1 Lechowski M1 instruado	K1 Poláková M2 ekologio	N3 Quednau M3 Latvio	K-p1 H1 Vrajitoru N4 Popov	
mar 08-23	Sm Ko Gl Ar	N1 Lechowski M1 instruado	K1 Poláková M2 ekologio	N3 Quednau M3 Latvio	K-p2, N-p1 H1 Vrajitoru N4 Popov	20:00 sekci- kunsidoj
mer 08-24	Sm Ko Gl Ar Bo	N1 Lechowski M1 instruado	K1 Poláková M2 ekologio	N3 Quednau M3 Latvio	H1 Vrajitoru N4 Popov M-p1	20:00 Akad. Forumo
ĵaŭ 08-25	Sm Ko Gl Dc Ar	N1 Lechowski M1 instruado	K1 Poláková M2 ekologio	N3 Quednau M3 Latvio	kursfina ekzameno sekcio 1 H1 Vrajitoru N4 Popov kursfinaj ekzamenoj sekcio 5 kursfinaj ekzamenoj sekcio 6	kf. ekz. H1
ven 26	Ko	Publikaj finekzamenoj		Publikaj finekzamenoj		
sab 08-27	Ko	Publikaj finekzamenoj			16:00 ĝ. asembleo	
	Ko				17:00 solena fermo	
dim		foriro				

Mallongigoj de la salonoj

Bo	Boulangier	inaŭguro	Komparu la klarigojn en ĉapitro 7.5
Sm	Schmidt	Sekcio 1 (kibernetiko)	
Ko	Komenský	Sekcio 2 (homsciencoj)	
Pe	Peano-Eŭklido	Sekcio 3 (struktursciencoj)	
Dc	Descartes	Sekcio 4 (filozofio)	
Gl	Galileo	Sekcio 5 (natursciencoj)	
Ar	Aristotelo-Gandhi	Sekcio 6 (morfosciencoj)	